



2025 JARRAPORTO

ESPERANTO-USA

+1 800-ESPERANTO

EUSA@esperanto-usa.org

2014 Capitol Ave, #100
Sacramento, CA 95811



Paĝnumero	Titolo
3	Raporto de la Prezidanto
12	Raporto de la Ĝenerala Direktoro
15	Raporto de la Vicprezidanto
17	Raporto de la Kasisto
21	Raporto de la Sekretario
23	Raporto pri la Membreca Komitato
25	Raporto pri la Speciala Interesa Grupo (SIG) pri Amatora Radio
26	Spertoj kiel estrarano de Esperanto-USA
28	Pensoj pri la PER en 2025
30	Pensoj pri la 6a Usona Bona Film-Festivalo
32	Pensoj de Aktiva Membro de Nia Komunmo
34	Listo da Forpasintoj



Raporto de la Prezidanto

Brandon SOWERS

Saluton, karaj gesamideanoj, kaj bonvenon al la *Dulanda Kongreso de Esperanto*, gastigata de Esperanto-Toronto! Je la lasta kalkulo, tiu ĉi kongreso havas 120 partoprenantojn. Tio estas bonaŭgura nombro: ni same nun festas 120 jarojn de la organizita Esperanto-Movado en Norda Ameriko, post la fondiĝo de la *Esperanto-Asocio de Norda Ameriko* en 1905. Laŭ la kvanto de aliĝintoj, estas ankaŭ la plej granda kongreso de Esperanto-USA en 30 jaroj, post la kongreso de Novjorko en 1995, kiu kalkulis je 180 aliĝintoj. Estas certe la plej granda Esperanto-aranĝo en la ĉefe anglalingva parto de Norda Ameriko dum tiuj tri jardekoj. Ni estas je nivelo preskaŭ komparebla kun la diversaj *Tut-Amerikaj Kongresoj de Esperanto* en Meksikurbo (169), Havano (178), kaj Montrealo (222). Kompreneble, la *Universala Kongreso* de Montrealo, kun siaj 859 aliĝintoj, estas en tute alia skalo, kaj verŝajne restos tie, ĝis iam tiu ĉi mondoparto denove gastigos UK-n.

Mi komenciĝas tiel, por kuntekstigi la atingojn de la ĉi-jara kongreso, kaj memori nin pri nia historio. Estis aŭdace, provi kune organizi kongreson inter du organizoj, des pli, ĉar ni kunlokgis NASK kaj tiel enplektis ankaŭ *Esperantic Studies Foundation*. Sed, je la

momento en kiu mi skribas, mi pensas, ke ni devas fieri. La kongreso ne nur havas preskaŭ rekordan nombron de partoprenantoj, sed ĝi havas ankaŭ tre buntan programon, kaj la indikoj montras, ke ĝi estos ankaŭ finance sukcesa. Mi kredas, ke la kongresoj estas unu indiko de la ĝenerala stato de la organizo kaj de la movado, kaj laŭ tiu indiko, ni iras en bonan direkton. Kompreneble, ni devos rigardi la aliajn indikojn, sed mi kredas ke ili ĝenerale korespondas.

Mi volas ankaŭ substreki kiom grava estas por ni denove kongresi en Kanado, kun samideanoj el Kanado kaj el pluraj mondopartoj, same kiel ni faris en 2022 en Montrealo. Mi forte kredas, ke kiam estontaj historiistoj de nia movado analizos nian movadon, ili parolos pri la "post-Montreal" epoko de la Esperanto-movado en Norda Ameriko. Certe por Esperanto-USA, ĝi estis ŝlosilo. Tiun UK en Montrealo partoprenis amaso da usonaj esperantistoj, plenaj je energio kaj iniciatemo post 3 jaroj da izolo. Estis multaj kiuj lernis Esperanton dum la pandemio kaj spertis veran renkontiĝon por la unua fojo dum tiu kongreso. Same, estis pluraj kiuj kvazaŭ revenis al la movado, kiuj eble ne partoprenis grandajn Esperanto-aranĝojn en Norda

Ameriko dum multaj jaroj. Mi estis inter tiu grupo de 'revenantoj', kaj la energio, kiun mi vidis inter la usonaj Esperantistoj tie konvinkis min, ke nia movado havis grandan porcion da potenciala energio, kaj ke kun kompetenta, profesieca, kaj dediĉita estraro, Esperanto-USA povus esti tre utila organizo por kunligi usonajn Esperantistojn kaj disrompi barilojn, ke tiu potenciala energio povus iĝi efektiva, ke ni povus multe antaŭenigi nian aferon por la estonteco.

Do, mi raportos ĉi-jare pri la plena kunteksto de la organizo dum la lastaj jaroj, pri la defioj, kiujn ni alfrontis kaj superis, kaj la celoj, kiujn ni havas por la venonta(j) jaro(j).

Tiu ĉi kongreso estas la dua dum mia mandato kiel prezidanto, post mia elekto en 2023. Mi sciis tiam, ke estus pluraj defioj por superi, sed mi apenaŭ povis antaŭvidi, kiom multaj ili estus, kaj kiom da laboro ili postulus. Ni jam akiris multon, kaj mi devas substreki, ke tio absolute ne estus ebla sen la forta kunlaboro inter la nunaj estraranoj kaj la ĝeneral direktoro. Mi sentas, kvazaŭ ni kune pilotas la barkon de Tezeo, kaj ke dum la lastaj du jaroj ni preskaŭ komplete rekonstruis ĝin, pecon post peco. Mi specifigos plurajn lokojn poste.



*ĉe la Usona Kongreso de
Esperanto en 2024*

Aktuala Situacio; Atingoj ekde 2023

Membrokvanto. Mi komenciĝos per la membrokvanto, pro tio ke ĝi estas, samkiel la kongresoj, tre konkreta: la ciferoj ne mensogas. Se la membrokvanto falas, tio estas evidenta malbona signo pri la stato de la organizo, kaj se ĝi kreskas, evidenta tio bonaŭguras.

Dum jaroj, nia membrokvanto falis ĉiun jaron. Nia pinto dum la lastaj jaroj estis 471, en 2017. Post tiam, la kvanto falis ĉiun jaron, ĝis 2024. Ni jam raportis pri tio pasintjare, sed mi ĝojas raporti, ke la renverso de la tendenco estis ne efemera: ankaŭ por 2025, ni vidis kreskon denove. Ni havas nun 467 membrojn, tio estas, 99% de la kvanto, kiun ni havis en 2017. Ni bezonas nur kvin pliajn membrojn por superi tiun rekordon de 2017, kaj mi kredas, ke ni povas atingi tion eĉ dum la kongreso.

Krom la pura kvanto de membroj, 12 membroj dediĉis sin al dumviva membreco. Dum multaj jaroj, ni neniam ricevis pli ol 3 en unu jaro; en multaj jaroj, ni ricevis ekzakte 0.

Mi kredas, ke la ĝenerala kaj daŭra kresko en nia membro-kvanto estas granda signalo de konfido de la usona esperantistaro en la direkto kaj evoluo de la asocio. Plue, la amaso da novaj dumvivaj membroj reliefigas tion, ke multaj homoj kredas, ke Esperanto-USA havas promesplenan estontecon, kaj ke indas investi en ĝi.

Membrokvanto kaj ŝanĝo (%), 2017-2025

Jaro	Membrokvanto	Ŝanĝo de antaŭa jaro (%)	Komparo al 2017 (%)
2017	471	—	
2018	422	-10%	90%
2019	415	-2%	88%
2020	394	-5%	84%
2021	366	-7%	78%
2022	358	-2%	76%
2023	321	-10%	68%
2024	421	+31%	89%
2025	467	+11%	99%

Kun tiu kunteksto, ni esploru la aliajn ŝanĝojn, kiujn ni efektivigis en la ŝipo dum la lastaj du jaroj, por meriti tiun konfidon de la membroj.

La transiro de la Centra Oficejo. Unu el la grandaj defioj kiuj atendis min kiel nova prezidanto estis la bezono trovi novan ĝeneralan direktoron, kaj transirigi la Centran Oficejon. Mi sciis, ke Vilĉjo HARRIS, la tiama ĝenerala direktoro, jam dum jaroj esprimis sian volon emeritiĝi, kaj sian deziron, ke la estraro serĉi novajn kandidatojn, sed ke tio neniam efektiviĝis. Mi kredis, ke li meritis ripozon post multaj jaroj de laboro, kaj prioritatis tion.

Mi kredas ke nek mi, nek Vilĉjo, nek iu ajn alia membro de la estraro, sciis ekzakte **kiom** granda estus tiu projekto. Efektive, tio estis nova sperto por la organizo. Kiam Don HARLOW, kiu

plenumis tiun postenon dum multaj jaroj, subite mortis en 2008, kaj Vilĉjo akceptis la respondecon, li povis iri al funkcia, konkreta oficejo en Emeryville, kiun Don kaj aliaj prilaboris dum jardekoj. Certe Vilĉjo ankaŭ faris multon por plu evoluigi aferojn: mi komprenas, ke antaŭ li, ĉiuj el niaj datumoj, inkluzive pri nia membrohistorio, estis manskribitaj en paperaj libroj, kaj Vilĉjo kreis komputilajn sistemojn por teni ĉion. Li ankaŭ konstruis retan version de nia libroservo, kaj komencis uzi *QuickBooks* por libroteni. Ĉiuj tiuj estis grandaj atingoj.

Tamen, pro la decido en 2013 forlasi la fizikan oficejon (kiun mi ne ĉitie kritikas), nia "centra oficejo" iĝis la gastĉambro de la domo de Vilĉjo en Majno. La komputilaj sistemoj, kiujn li uzis ekde 2008, bone funkciis por li kiel unuopulo, sed ili postulis multe da teknika scio, kaj nur funkciis sur lia komputilo - nek la membrodatumbazo, nek lia versio de *QuickBooks* estis konstruitaj por interreta kunlaboro, kiel estas pli-malpli necesa en 2025.

Kiam ni dungis Amanda SCHMIDT kiel la nova ĝenerala direktoro, ni sciis, ke ni devus plani por transira tempo, dum kiu la du povus ambaŭ labori. Sen tio, okazintus katastrofo. Ni supozis, ke ses monatoj estus sufiĉe, sed efektive, mi sentis, ke ni estis preskaŭ en maratono, kaj devis multe barakti por atingi la finlinion antaŭ ol la pasintjara kongreso, aŭ ĉio eksplodiĝus. Mi ĝojas konfirmi, ke pro la sindediĉo de Amanda kaj Bill, kaj ankaŭ multe da helpo de Quintyn BOBB, ni atingis tion. Ni povis gratuli Vilĉjon pro lia emeritiĝo pasintsomere, kaj ni nun festas plenan jaron, dum kiu Amanda plenumas la respondecojn de la ĝenerala direktoro en Sakramento, Kalifornio.

Retrorigardante al tiu jaro, mi kredas, ke estas nenia dubo, ke ni estas mirakle bonŝancaj, ke Amanda estis preta akcepti la postenon en tiu momento. Ŝi ne fortimiĝis, kiam estis defioj. Male, ŝi entuziasme serĉas manierojn plibonigi kaj modernigi la funkciadon de la centra oficejo, samkiel Vilĉjo faris en 2008. Ŝi priskribos la detalojn de tio pli bone ol mi en sia

propra raporto, do mi simple konkludos, ke mi antaŭvidas, ke ŝia deĵoro portos multajn bonojn por nia organizo kaj movado.

Relanĉo de la Bulteno. Alia pendanta defio, kiam mi enoficiĝis, estis tio, ke ni devis serĉi nova(j)n redaktoro(j)n de la bulteno, *Usona Esperantisto*. Ĝi estis senlace redaktata de Hoss FIROOZNIA dum pli ol jardeko, sed li komunikis al la estraro komence de 2023 ke li volis transdoni la respondecon, kaj ke oni serĉu novajn kandidatojn. Ĝis aŭtuno de 2023, venis nur unu propono, de samideano en Ĉeĥujo. Mi kredis, ke tamen gravas, ke la bultenon de la asocio redaktu iu, kiu estas membro kaj havas almenaŭ fortajn ligojn al la movado en Usono. Do, mi komencis serĉi novajn kandidatojn. Unue, mi konsideris kaj Lua HALL kaj Alena ADLER kiel unuopajn kandidatojn; mi tre ĝojas, ke venis la ideo, ke ili kandidatiĝu kiel teamo. Mi kredas, ke la rezultoj de ilia kunlaboro estas evidentaj.

Ni ankaŭ samtempe relanĉis *Usonan Esperantiston* kiel unue fizika, papera revuo, kiu aldone havas retan kaj PDF-an version. Antaŭe, la elektronika versio estis la ĉefa, kaj la presado por tiuj, kiuj petis tion, estis akcesora afero, kiun faris Vilĉjo de sia oficejo. Por tiuj, kiuj vidis presitajn numerojn de antaŭe, kaj komparas ilin kun la nunaj, la diferenco estas okulfrapa.

Tio ne estas nur teoria aŭ bagatela afero. La revuo estas unu el la konkretaj aferoj, kiujn nia organizo faras, kaj nun

ĝi aperas konkrete ĉe la poŝtkestoj de niaj membroj, kaj en ties manoj. Ili povas meti sur la kafotablo kaj legi diversajn artikolojn kiam ili havas liberajn minutojn. Niaj membroj povas montri la revuon al konatoj, por pruvi, ke Esperanto estas vera, konkreta, kaj aktuala afero, ne nur io de la pasinteco. Mi kredis, kaj vetis, ke la averaĝa membro legos pli grandan parton de la revuo en la papera versio ol en la reta, kaj mi kredas, ke ni nun vidas la veron de tio. Inter la celaro de *Usona Esperantisto* estas provizi niajn membrojn per leginda kaj atentokapta materialo, kun emfazo pri la internacia movado de usona vidpunkto kaj pri la movado en usono mem; la revuo ankaŭ veku la apetiton de membroj por mem verki, por aperigi siajn proprajn tekstojn en la revuo. Ŝajnas, dum la lastaj 6 numeroj, ke ni vidis bonan progreson en ambaŭ tiuj kampoj.

Menciindas, rilate al la bulteno, la paŝoj kiujn ni faris por igi ĝin daŭripova por ni kaj por la planedo. El la financa vidpunkto, ni reakiris nian permesilon "*Nonprofit Periodical*" de USPS, kiu validas por periodaĵoj, kiujn neprofitcelaj organizoj sendas almenaŭ kvar fojojn jare. Per tiu permesilo, ni afrankas ĉirkaŭ po \$0.50 por ĉiu ekzemplero; antaŭe, ni devis pagi ĉirkaŭ po \$1.50. Do, kvankam ni sendas pli da ekzempleroj, la suma elspezo ne estas signife pli alta.

Simile, ni kontraktis kun profesia presejo (*Nero Ink*), kiu kapablas produkti altkvalitan, belan revuon. Pro tio, ke ili specialiĝas pri tio, la

po-ekzemplera kosto estas malpli alta, ol kiam ni presis la ekzemplerojn en la centra oficejo, aparte kiam ni konsideras la koston de laboro. Plue, Nero estas tre ekologiema presejo, kiu presas je malalta varmo (tiel konsumante malpli da energio), kaj provas reuzi preskaŭ ĉion, per la sistemo kiun oni nomas angle "*Closed-Loop Recycling*."

Dum la lasta jaro kaj duono, mi ricevis multajn komentojn de membroj, pri kiom kontentaj kaj fieraj ili estas pri la presita *Usona Esperantisto*. Eĉ plurajn fojojn jam okazis, ke iu estis tiom kontenta pri ĝi, ke tiu decidis donaci al la organizo, aŭ meti nin en sia testamento. Do, efektive, ni tiel eĉ *enspezas* per la bulteno!

Retejo kaj Libroservo. En januaro de 2024, la tuta retejo de Esperanto-USA malaperis. Ni esploris la eblon pagi al servo por skrapii la Interretan Arĥivon por rekrei nian retejon, sed la proponita kosto estis enorma. Ni ŝuldas grandan dankon al Quintyn BOBB, kiu kreis tute novan retejon pere de la moderna platformo *Wordpress*. De tiam, aferoj bone funkcias ĉe la retejo, kaj mi ĝenerale aŭdas komentojn, ke estas facile ĝin uzi kaj trovi informon bezonatan.

Lige al la retejo estas nia retbutiko, kaj nia libroservo. Tio estis alia parto de la transiro: efektive du partoj, la retpaĝoj, kaj la fizika stoko de la libroj kaj varoj.

Rilate al la retpaĝo, ni relanĉis ĝin per la moderna platformo *Square*. Mi

kredas, ke multaj membroj jam trovis tion multe pli konvena ol la antaŭa: la kvanto da mendoj signife plimultiĝis.

Ni kontentas pri tio, ĉar tio signifas, ke ni sukcesis vendi grandan parton de la stoko, kiu restis en Majno. Tio donis al ni konfidon komenci aldoni al nia stoko kaj modernigi nian provizon. Ĉe tiu ĉi landa kongreso, vi rimarkos la novan libron *Centvorte*, de nia membro Rafa NOGUERAS; vi same rimarkos multajn novajn librojn de la eldonejo KAVA-PECH, kiu havis grandan stokon en Montrealo, kio signifis ke ni povis akiri librojn por tiu ĉi kongreso pagante nek afrankon nek dogan imposton. Ni ankaŭ celas aĉeti novajn librojn dum la UK en Burno kaj resendi ilin pere de usonaj partoprenantoj. La ideo estas iom post iom ampleksigi nian katalogon, ĉiam kun zorgo evitante nenecesajn elspezojn.

Krom novajn librojn, vi ankaŭ rimarkos plurajn novajn varojn, aparte poŝtkarton, glumarkon, kaj libropaĝmarkilon, dezajnitajn de Anne SCHILL (kiun vi povos renkonti ĉe la kongreso). Tiuj fontas el la libropaĝmarkilo-konkurso, kiun organizis la promocio komitato. Ni esperas, ke ili plaĉos al multaj esperantistoj kaj samtempe estos allogaj por la ekstera publiko. Ni esperas per ili ankaŭ altigi la profilon de Esperanto-USA por la publiko kaj en la internacia movado. Se tiuj bone vendiĝos kaj disvastiĝos, tio estos bona signalo por produkti aliajn similajn aferojn en la estonteco.

Vera Buĝeto. Dum multaj jaroj, la organizo funkciis sen vera buĝeto. Tio, kion ni nomis buĝeto, anticipis nur elspezojn por 'administraj' aferoj. Tio signifas, ke oni tute ne planis elspezojn por 'programaj' aferoj, tio estas, *por la laboro kiu antaŭenigas nian mision*. Mi scias, ke por multaj homoj, kiam iu parolas pri buĝetoj, tio estas "fino de nia latino", sed gravas diri tre klare: *neniu serioza neprofitcela organizo (aŭ organizo entute) povas vere funkcii sen vera buĝeto*.

Kiam mi diras 'vera buĝeto', tio signifas: multampleksa buĝeto, kiu planas por ĉiu enspezo kaj ĉiu elspezo. Por la ĝenerala publiko, tio estas la signifo de la vorto "buĝeto". Se oni planas nur por iuj partoj de la elspezoj kaj enspezoj, estas kiel sekvi mapon kiu montras nur parton de la itinero. La rezulto estos plena ĥaoso.

Kaj efektive, tiu manko de vera buĝeto kaŭzis multege da konfuzo kaj dubemo pri nia financa stato, kaj pri kiel ni devas prioritati aferojn. Neniu estis bone informita (inkluzive de la estraro kaj la centra oficejo), kaj neniu povis fari bonajn decidojn. Homoj timis elspezi, nesciante, ĉu ni povas; kaj kiam nia enspezo per membrokotizoj falis jaron post jaro, tio ne kaŭzis panikon, ĉar la parta "buĝeto" kiun ni havis, tamen ne montris problemojn.

Tamen, malantaŭ la kulisoj, la stato de niaj financaj libroj estis tute pelmela. Tio rezultiĝis de tio, ke ni delonge ne havis helpon de profesia librotenisto, kiel ĉiu serioza organizo faras. Vilĉjo faris sian plej bonan, sed li simple ne

havis la sperton aŭ konon, kaj dum la jaroj estis multaj eraroj kaj problemoj.

Tiu situacio estis absolute ŝanĝenda se ni vere volas kreski kaj plenumi nian mision kiel organizo, kaj ni sukcesis alfronti ĝin ĉefe dank' al la iniciato kaj laboremo de nia nova kasisto, Matt BROOKS. Ni ankaŭ dungis profesion libroteniston, Deepika YELDANDI, kaj ili laboris kun Amanda por solvi la historiajn problemojn pri niaj financaj libroj kaj transirigi al *QuickBooks Online*, moderna kaj profesia rimedo por libroteni. Pere de QBO, Matt povis proponi la unuan kompletan, multampleksan, veran buĝeton kiun la organizo havas dum jaroj, kiun la estraro akceptis post diskuto kaj kelkaj ŝanĝoj. Por la unua fojo, ni havas mapon, kiu montras, kiel ni atingos niajn celojn, per la rimedoj, kiujn ni havas, kaj kiujn ni planas akiri. Mi jam antaŭĝojas fine de la jaro bilanci nian unuan veran buĝeton. La estraro tiam povos lerni de la pasinta jaro, kaj diskuti pri kiel ni povas pli bone plani niajn financojn kaj prioritatojn por la venonta jaro.

Membrodatumbazo kaj Membrolisto.

Alia defio rilate al la transiro de la Centra Oficejo estis kion fari pri la datumbazo. Vilĉjo konstruis datumbazon en 2008, sed ĝi funkciis nur en lia komputilo kaj postulis lian tre detalan scion pri la teknikaj funkcioj de la datumbazo.

Kiel provizora solvo, ni ekuzis *Salesforce* pasintjare, kaj ĝi funkciis, sed ni sentis iujn mankojn. Ni esploris aliajn

eblojn, kaj trovis *Springly*, kiu provizas multajn novajn eblojn. Ĝi rekte akceptas pagojn (kotizojn, donacojn, kaj aĉetojn), konservas ĉiujn membrodatumojn en facile uzebla sistemo, kaj ankaŭ kapablas rekte sendi retmesaĝojn al nia membraro, kio signifas, ke ni ne devos provi kunteksi tre diversajn sistemojn (*Salesforce*, *Mailchimp*, kaj *Zeffy*). Sed mi pensas ke por la averaĝa membro, la plej interesa parto estos la membro-retejo, kiun ni kreis pere de *Springly*. Ĝi permesos al membroj krei konton, kontroli kaj redakti siajn datumojn, kontroli siajn historiojn de kotizoj kaj donacoj, kaj aranĝi novajn pagojn. Eĉ pli interese: *per tiu membroretejo, eblos aliri al konstante ĝisdatamembrolisto*. Membroj povos mem kontroli, ĉu ili volas aperi en tiu listo, kaj kiun informon ili volas aperi. Ni atendas, ke tio estos multe pli utila ol la paperaj membrolistoj, kiujn la Centra Oficejo sendis pasintjare, kaj samtempe postulos multe malpli da laboro kaj elspezo de la organizo.

Celoj por la venonta(j) jaro(j). Restas unu jaro de mia mandato, do, mi certe devas plani por tiu jaro. Mi tamen ankaŭ kredas grave komenci plani por venontaj jaroj, por havi ideon pri kiel niaj celoj por la venonta jaro enkadriĝas en pli granda strategio.

Multe helpis por tio la aparta semajnfina kunsido de la ekzekutiva komitato en januaro, dum kiu la oficioj de la estraro povis detale esplori diversajn flankojn de la organizo kaj

kune pripensi celojn kaj strategiojn.
Sube mi listigas kelkajn:

Subvencipetado. Ni volas komenci peti subvenciojn por diversaj programoj, kiujn ni nun organizas (kiel la fimfestivalo) aŭ povas organizi (kiel retaj esperanto-kursoj). Do estas nun realisme nur dank' al la profunda profesiigo en la kulturo de la estraro kaj de niaj financoj ĉefe: ĉiu subvencianto volos vidi, ke sia mono estas bone prizorgata kaj uzata por ĝiaj celoj.

La ekzekutiva komitato laboris dum la lastaj monatoj kun profesia konsilanto por pretigi nin por peti subvenciojn, kaj mi kredas, ke ni komencos tion fari dum la dua duono de 2025. Tio estas tute nova kampo por Esperanto-USA, kaj povas esti, ke nia laboro ne tuj estos fruktodona. Tamen, mi kredas, ke en la longa perspektivo, tio malfermos multajn pordojn por nia organizo.

Profesiigo de la Landaj Kongresoj. Ni kredas, ke bone organizi Landan Kongreson postulas grandan kvanton da laboro. Ni profunde dankas al Esperanto-Toronto pro ilia laboro ĉi-jare; kaj ni tamen timas, ne malmultaj aliaj lokaj grupoj povos same bone organizi kongresojn en la estonteco. Ni kredas, ke estos multaj avantaĝoj, se la kernan parton de la organiza laboro faras la Centra Oficejo en la estonteco, kaj lokaj volontuloj nur devos fokusiĝi pri tiuj aferoj, kiujn nur surlokaj homoj povus fari. Ni ankaŭ kredas, ke se la

rilata laborkosto estos en la buĝeto por estontaj kongresoj, tio bone funkcios: la plej grava afero, estas ke homoj volas bone organizitajn kongresojn, kaj ni volas eviti erarojn, kiuj povas kaŭzi grandajn elspezojn. La unua provo estos jam por 2026.

Pli profunda engaĝiĝo kun la internacia movado. Dum longa tempo, la Esperanto-movado en Usono estis iom izolita de la internacia movado. Estis facile senti kiel la orfaj kuzoj de la 'vera movado', kiun oni ĝenerale lokigas en Eŭropo. Nur manpleno da samideanoj en Usono partoprenis la internacian movadon, kaj ĝenerale la kono de la internacia movado restis nur ĉe ili. Samtempe, la usona movado havis tre malaltan profilon en la internacia movado.

Ni volas ŝanĝi ambaŭ partojn de tiu situacio.

Unue, ni certigos, ke pli da usonaj esperantistoj engaĝiĝos kun la internacia movado. Pasintjare ni subtenis Lua HALL por iri al la IJK, kaj ni havis unu el la pli grandaj delegacioj ĉe la UK en Tanzanio. Ĉi-jare, ni por la unua fojo en multaj jaroj sekvas nian statuton pri la selekto de nia "komitatano A", nia reprezentanto en la gvida instanco ĉe la Universala Esperanto-Asocio. Per tio, la estraro havos regulan raportadon pri la situacio en UEA kaj povos klare reprezenti nian starpunkton. Ekzemple, ni verŝajne volos esprimi malkontenton pri la decido organizi la UK-n venontjare denove en Eŭropo, kaj nur 200 mejlojn

for de la ĉi-jara gasturbo, anstataŭ prioritatigi geografian diversecon en la planado de UK-oj.

Ni ankaŭ proponis al UEA modifi la statuton por havi pli reprezentan komitaton. Se tio sukcesas, ni poste rajtos je dua (kaj eble baldaŭ je tria) komitatano A. Tio rezultigos, ke nia ligo al UEA ne dependu je unusola homo, sed ke ni havos teamon kun sperto pri tiu organizo kaj pri la internacia movado: teamon, kiu povas evolui dum la jaroj sen devi transdoni ĉiun scion de unu homo al alia.

Krom nia engaĝiĝo kun UEA, ni volas teksti pli fortajn ligojn kun aliaj landaj movadoj en Ameriko, kaj eventuale kun aliaj en ĉefe anglalingvaj landoj. Ni jam havis bonan progreson en Amerika kunlaboro pro tio ke ni sendis delegacion al la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Brazilo en 2023. Tamen, evidente la elstara punkto tiu-rilate estas nia kunlaboro kun KEA en la komuna organizado de tiu ĉi kongreso. Ni kredas, ke tio estos komenco de fruktoporta kunlaboro inter ambaŭ organizoj por multaj jaroj.

Ni ankaŭ volas altigi la profilon de la usona movado en la internacia. Ni kredas, ke estas multaj aferoj, pri kiuj ni povas kaj devas fieri, kaj ke efektive se samideanoj en aliaj mondopartoj scius pri tiuj, ili multe aprezus.

La Usona Bona Film-Festivalo estas unu juvelo ĉi-rilate: ĝi estas sufiĉe bone konata, kaj estas afero, kiun neniuj aliaj organizoj en la movado faras. Tamen ĉiam eblas fari eĉ pli en tiu rilato, kaj mi

antaŭĝojas propagandi ĝin dum la Universala Kongreso ĉi-jare.

Ni ankaŭ kredas, ke aliaj rezultoj de nia laboro estos imponaj al la internacia movado, nome, la bulteno kaj la novaj varoj kiujn ni produktas. Ni montros tiujn fiere ĉe nia budo dum la Movado Foiro ĉe la Universala Kongreso ĉi-aŭguste.

Finaj Vortoj

La lastaj du jaroj estis plenaj je defioj, kaj komence estis multaj kaŭzoj por konsterniĝi. Tamen, mi kredas, ke post du jaroj, la esperigaj signaloj estas tre fortaj. La organizo nun iras en tre bona direkto, kaj ĝi havas fortan movokvanton. Se vi pripensas engaĝiĝi, ne hezitu! La venontaj jaroj estos plenaj je novaj atingoj, kaj vi povos estis parto de tio.

Mi tre fieras, pro tio, kion ni jam faras, kaj antaŭĝojas, pri tio, kion ni faros en la baldaŭa estonteco.





Raporto de la Ĝenerala Direktoro

Amanda SCHMIDT

Mi apenaŭ povas kredi, ke jam pasis tuta jaro ekde mia transpreno de la rolo de Ĝenerala Direktoro de Vilĉjo HARRIS. Tiom da interesaj aferoj okazis, ke mi apenaŭ scias kiel komenci raportoj pri ĉio! Kaj fakte, pro tiom da taskoj kaj devoj lastatempe, mi nun verkas tiun ĉi raporton ĉe la Nordamerika Somera Kursaro (NASK), frumatene, dum ĉiuj aliaj NASK-partoprenantoj dormas ĉi tie ĉe la Internacia Lerncentro en Toronto.

Se vi estas novulo al nia organizo, mi klarigu ke mi rolas kiel nia ĉefa pagata laboranto; mi laboras kutime pli malpli 30 horojn semajne por Esperanto-USA el mia hejmofoicejo en Sakramento, Kalifornio. Mi faras ĉiujn administrajn taskojn de la organizo: respondas al membraj demandoj kaj petoj, traktas financajn kaj registrarajn devojn, mastrumas nian retbutikon, komunikas regule kaj planas nian agadstrategion kun nia estraro, superrigardas niajn komitatojn, prizorgas niajn rilatojn kun aliaj Esperanto-organizoj (ekzemple la Universala Esperanto Asocio), pagas ĉiujn niajn fakturojn, ktp.

Kiam mi rigardas malantaŭen al la pasinta jaro ekde nia bonega 2024 kongreso en Losanĝeleso, mi miras kaj fieras pri kiom da aferoj ni sukcesis fari kune en nia organizo dum unu jaro sub la lerta gvidado de Brandono (prezidanto), Kuo (vicprezidanto), Mateo (kasisto), kaj aliaj. Imagu! Dum la lasta jaro, nia organizo:

- Kreis komplete novan retbutikon uzante modernan platformon, Square, kun multaj fotoj de ĉiu varo, plenaj priskriboj dulingve, kaj alloga, facile uzebla aspekto
- Konsultiĝis kun Pat Egan, plurjardeka membro de Esperanto-USA kun multe da sperto pri administrado de neprofitcelaj organizoj; ŝi kunvenis kun mi, Brandono kaj Mateo pasintaŭtune kaj faris multajn detalajn rekomendojn pri kiel perfektigi nian publikan impostdeklaron, Formularo 990, per kiu fondusoj kaj donacontoj taksas nian organizon
- Trovis tre lertan impostkontiston, Harmon Burstyn, CPA ('Certified Public Accountant') kiu en aŭtuno 2024 helpis nin prepari nian Formularon 990 por la antaŭa

financjaro (2023) per profesia helpo por la unua fojo, kaj kiu denove faros ĉi-aŭtune por 2024

- Per la helpo de Deepika Yeldandi, nia profesia konsisto, solvis plurajn problemojn pri niaj financaj datumoj en Quickbooks, kiuj fontis de eraroj faritaj en la pasinteco, kaj finfine kontentis ke niaj financaj resumoj estis tiel ĝustaj, kiel eblis en nia 2023 Formularo 990
- Superis malfacilaĵojn kaŭzitaj de naturkastastrofo (uragano), kiu malebligis al unu el niaj redaktoroj, Alena, povi labori pri Usona Esperantisto 2024:3 pro manko da elektro kaj interretservo dum semajnoj; tamen, pro dediĉegita kunlaboro dum pluraj tagnoktoj, la redakcia teamo fine sukcesis kompletigi la bultenon (malfrue, neeviteble)
- Trafosis niajn membrodatumojn serĉante erarojn kaj malaktualajn informojn pri niaj membroj por krei tute ĝustan liston de aktualaj membroj prepare por nia ĉiujara sumado por UEA de niaj UEA-membroj kaj ne-UEA membroj (por kiuj ni devas krompagi)
- Trovis plurajn Tutvivajn Membrojn, de kiuj ni ne aŭdis dum multaj jaroj, kaj komencis projekton kun la Membreca Komitato kontakti tiujn homojn por ĝisdatigi niajn datumojn
- Kreis novajn atestilojn por niaj Tutvivaj Membroj, kiujn mi sukcesis

sendi kun dankleteroj al multaj (ankoraŭ ne ĉiuj) Tutvivaj Membroj, invitante ilin al speciala festeneto ĉe la DLK

Krome, dum la lastaj ses monatoj mi kunlaboris preskaŭ konstante kun la Loka Kongresa Komitato por organizi nian Dulandan Kongreson. Nia teamo konsistis el membroj de 4 organizoj: Esperanto-USA, Kanada Esperanto-Asocio, Esperanto-Toronto, kaj Esperantic Studies Foundation (kiu organizas NASK). Mi fieras diri ke ni eĉ invitis 5 internaciajn gastojn per financa subteno de nia organizo, kiu multe internaciigis la partoprenantaron ĉe la DLK. Ĝenerale, la kongresplana laboro estis tre komplika, sed ĝinda, pro la bonega teamo kiun ni havis. Foje estis malkonsentoj aŭ problemetoj, kiujn mi devis helpi solvi, kaj ekde antaŭ kelkaj monatoj mi eĉ ekhelpis gvidi la kunvenojn; sed plejparte ĉio iris sufiĉe glate. La kvanto da detaloj kiujn ni devis trakti, vere mirigis min, kaj estis tre interese por mi vidi kiom da laboro necesas por krei kongreson, speciale komunan kongreson inter du landoj (kaj 4 organizoj!) Nia tuta Loka Kongresa Komitato lernis multon, kiun ni povos uzi por fari nian postkongresan raporton kaj rekomendojn por pli glata planado venontjare.

Aliaj atingoj ĉi-jare pri kiuj mi fieras raporti:

- Por la unua fojo, niaj oficiroj kaj mi faris tut-semajnfanan kunvenon

('Executive Committee Retreat') kie ni diskutis niajn planojn por progresigi kaj sukcesigi nian organizon, kaj rezulte ekagis plurmaniere pri diversaj iniciatoj

- Ni eklaboris kun Lorinda Santana, profesiulo pri subvencipetado, kiu trejni trovis taŭgajn privatfondusajn subvenciojn kaj proponi nian organizon por ties financa subteno
- Ni konsultiĝis kun aliaj profesiuloj pri digitala reklamado kaj retpaĝa efikeco, per profesiaj servoj rabatitaj por neproficelaj organizoj per Tech Soup
- Ni trovis novan platformon, Springly, por digitala membrolisto kaj membroretejo, kie homoj povos pli facile trovi aliajn lokajn membrojn, kaj ĉi-printempe detale esploris la eblecojn kaj trejniĝis kiel krei nian retejon kaj mastrumi niajn datumojn tie ekde nun
- Ni sukcese vendis la plejmulton el nia libroserva stoko, kaj ekakiris novajn librojn kaj varojn kiujn ni planas meti en nian retbutikon post la kongreso
- Ni allogis kvar novajn kandidatojn al du vakaj lokoj nia estraro ĉi-jare; estas tre agrable havi pli da kandidatoj ol lokoj, por iom da sana konkuro inter pluraj bonaj eblecoj (bedaŭrinde, unu el ili devis retiri sian kandidatecon mallonge antaŭ la balotado)

Kompreneble, ankaŭ okazis malgataĵoj kaj malfacilaĵoj foje dum la pasinta jaro. Por mi la plej defia parto de mia laboro estas la interhomaj konfliktoj. De tempo al tempo, ni ricevas plendon de iu membro kiu estas malkontenta pri io – foje pri iu eraro kiun ni faris (ekzemple la unua retbalotilo, kiun mi malĝuste agordis ĉi-jare), foje pri konduto pri alia membro. Estas malfacile kaj streĉe kiam tio okazas, ĉar mi devas klopodi respondi dece kaj ĝentile al ĉiuj koncernaj homoj, kaj ankaŭ klarigi pri kion nia organizo faras por solvi tiajn problemojn. Okazas multe da diskutado, eĉ foje debatoj, en niaj komunikoj en Slack inter mi kaj la estraranoj pri tiaj situacioj: kiel alfronti la situacion, kiel dece decidi kion fari, kiel komuniki niajn decidojn, ktp. Tamen pro la alta kvalito de la homoj en nia estraro, tiaj problemoj finfine ĉiam taŭge solviĝas. Mi tre ĝuas la bonegan kunlaboron de nia teamo, kaj sentas tre dankema ke ni havas tiom da kapablaj, afablaj talentuloj en nia organizo. Mi invitas vin, membroj, iĝi aktivaj en niaj komitatoj de Esperanto-USA. Estas bonega momento partopreni la aktivan agadon de nia asocio!



*ĉe la Usona Kongreso de Esperanto
en 2023*



Raporto de la Vicprezidanto *Quintyn "Kuo" BOBB*

Kiel registrita 501(c)(3)-organizo, Esperanto-USA havas la oficialan statuson de neprofitcela organizaĵo en Usono, kiu donas la rajton de impostaj esceptoj. Tio signifas, ke ni bezonas agi por antaŭenigi nian mision – tio estas la edukado kaj disvastigo de Esperanto en Usono. Kiel vicprezidanto kaj magistra studento kiu studas neprofitajn organizojn, mi aktivmaniere aplikas kaj plivastigas miajn sciojn — de administrado ĝis strategia planado — por subteni kaj fortigi niajn strukturojn kaj procedurojn.

Mi sincere dankas al la tuta teamo pro ilia sindediĉo kaj kunlaboro; en miaj kursoj, mi ofte aŭdas ke la plej grava ero de bonfunkcia organizaĵo estas kompetenta kaj subtenema teamo. Sen tiel aktiva grupo de volontuloj kaj pasiaj membroj, niaj sukcesoj ne estus eblaj.

Mi tre ĝojas raporti (tamen mi lasos la specifajn detalojn al la aliaj fakuloj en tiu ĉi raporto), ke hodiaŭ ni havas solidan financon bazon: ni havas klaran buĝeton, travideblan monregadon kaj precizan scion pri ĉiu el- kaj enspezo. Tio ebligas al ni respondeceme determini, kiel plej bone servu niaj elspezoj la financadon de

programoj kaj eventoj por plenigi nian mision.

Ni ankaŭ zorgas pri plena observemo al nia statuto kaj al la federaciaj kaj subŝtataj regularoj. Ĉar ni estas privata neprofitcela organizaĵo kun impost-escepta statuso donita de la IRS, ni devas sekvi ĝiajn regulojn por konservi tiun privilegion. Ni plenumas la tri ĉefajn devojn de estrarano:

Devo de prizorgo: prudenta kaj informa decidiĝo por protekti la organizon, atenta kaj aktiva plenumado de ĉiuj oficialaj respondecoj,

Devo de lojaleco: antaŭenigi la intereson de Esperanto-USA super ajnaj personaj aŭ eksteraj influoj,

Devo de obeemeco: agi strikte laŭ nia statuto, internaj reguloj kaj aplikeblaj federaciaj kaj subŝtataj leĝoj.

Ĉi tiu jura kaj normiga konscio certigas, ke nia laboro restu fidinda kaj laŭleĝa.

En mia rolo kiel vicprezidanto, mi prilaboris kaj subtenis multajn aferojn dum la jaro:

- Kunlaboro pri la Dulanda Kongreso kaj muntadode tiu ĉi jarraporto
- La libro-markila projekto,
- Subtenado de PER (Printempo Esperanto-Renkontiĝoj)

- Organizo de la 6-a Amerika Bona Filmfestivalo,
- Uzo de MailChimp por retroŝti niajn membrojn
- Ĉeesto ĉe trejnado pri subvencpetado
- Efektivigo de Springly por plifortigi kaj kunvenigi nian membrodatumbazon,
- Ĉisdatigo kaj administrado de nia retejo (kiun mi kreis pasintjare),
- Subtenado de la Membreca Komitato
- Subtenado de ViA
- ...kaj prilaboro de diversaj projektoj laŭbezono!

Ĉiu tasko estas por mi ŝanco apliki novajn ideojn kaj lerni novajn lecionojn.

Regule mi kunvenas kun Brandon (semajne, fakte!) kaj la

ekzekutiva komitato por difini nian strategion. Pli frue ĉi-jare la Ekzekutiva Komitato havis kunvenon en Charlotte, Norda Karolino; tie naskiĝis la unua skizo de nia valora deklaro (kiun ni prilaboros) kaj organizado de nia strategio.

Hodiaŭ nia organizo troviĝas en multe pli stabila kaj vigla stato ol kiam mi aliĝis. Mi dankas ĉiun membron de nia komunumo kiu ebligis tion ĉi. Via entuziasmo, kontribuoj, kaj via fido estas la fundamento de niaj nuna kaj estonteca sukceso. Estas mia plezuro apogi tiun ĉi organizon kaj la komunumon de Esperantistoj en Usono nun kaj estontece.





Raporto de la Kasisto

Matt "Mateo" BROOKS

Dum la pasinta jaro Esperanto-USA faris gravajn paŝojn al financa sano, travidebleco kaj daŭrigebleco. De solvado de historiaj kontaj defioj ĝis efektivigo de nia unua ampleksa buĝeto kaj lanĉo de strategiaj reformoj, ĉi tiu periodo markis pivotan momenton en la historio de nia organizaĵo. Rigardu kun ni la atingojn de la pasinta jaro.

Nia Financa Pozicio Superrigarde

Je la 31-a de majo 2025 (kompare kun la 31-a de majo 2024):

Tuta funkcia enspezo: 37 827 \$ (1,67 % plialtigo, ĉefe danke al kresko de la librobutiko)

Tuta funkcia elspezado: 38 846 \$ (6 % plialtigo, tamen ankoraŭ laŭ nia buĝeta plano)

Neta funkcia rezulto: – 1 019 \$ (deficito, plejparte pro ĉesado de vendi

UEA-membrecojn per la nova librobutiko)

Tuta neta enspezo (inkluzive investojn): 14 514 \$ vs. 16 564 \$ (ĉefe pro borsaj fluktuoj influantaj niajn investojn)

Aktivoj: Niaj nunaj likvidaj aktivoj estas 6,1 % pli altaj ol ĉi-tiam pasintjare, kreskante de 114 160 \$ en majo 2024 al 121 123 \$ en majo 2025. Tio montras pli fortan likvidecon kaj pli fortikajn operaciajn rezervojn ol antaŭ jaro.

Investoj: Niaj investaĵoj (ekskluzive la Reed Trust) estas taksitaj je ĉ. 574 000 \$ la 31-an de majo 2025, malpliiĝo de 4,9 % kompare kun la antaŭa jaro. Ĉi tiu ŝanĝo plejparte sekvas de borso-fluktuoj. Nia portofolio inkluzivas kaj donace-limigitajn donacfondaĵojn, kaj nelimigitajn investojn, subtenantajn longdaŭran misian sekurecon kaj operacian flekseblecon.

Statement of Financial Position

Esperanto-USA
As of May 31, 2025

Account	TOTAL			
	As of May 31, 2024	As of May 31, 2025	\$ Change (PY)	% Change (PY)
Assets				
Current Assets	\$121,123.32	\$114,160.22	\$6,963.10	6.1 %
Fixed Assets	-	-	-	-
Other Assets	\$574,049.90	\$603,893.72	-\$29,843.82	-4.94 %
Total for Assets	\$695,173.22	\$718,053.94	-\$22,880.72	-3.19 %
Liabilities and Equity				
Liabilities				
Current Liabilities	\$7,271.97	\$7,388.40	-\$116.43	-1.58 %
Long-term Liabilities	-	-	-	-
Total for Liabilities	\$7,271.97	\$7,388.40	-\$116.43	-1.58 %
Equity	\$687,901.25	\$710,665.54	-\$22,764.29	-3.2 %
Total for Liabilities and Equity	\$695,173.22	\$718,053.94	-\$22,880.72	-3.19 %

Statement of Financial Activity

Account	Jan 1 - May 31 2025	Jan 1 - May 31 2024 (PY)	\$ Change (PY)	% Change (PY)
▼ Income				
▼ 41000 Sales				
41100 Catalog Sales	2,387.87	900.74	1,487.13	165.1 %
41200 Non-inventory Sales	71.73	478.48	-406.75	-85.01 %
41300 ELNA Published Bo...	-	47.28	-47.28	-100.0 %
41600 Postage/Handling F...	-	567.86	-567.86	-100.0 %
41700 Sales of Usona Esp...	-	80.00	-80.00	-100.0 %
41800 UEA Memberships/...	-	5,367.41	-5,367.41	-100.0 %
Total for 41000 Sales	\$2,459.60	\$7,441.77	-\$4,982.17	-66.95 %
42000 ELNA Convention Inco...	3,305.00	17,120.00	-13,815.00	-80.7 %
42100 ELNA Membership Dues	6,073.00	8,615.00	-2,542.00	-29.51 %
▼ 43000 Donations	\$857.52	\$27.30	\$830.22	3041.1 %
43300 General Fund Dona...	8,616.03	4,840.50	3,775.53	78.0 %
43200 Goldman Fund Do...	-	553.00	-553.00	-100.0 %
Total for 43000 Donations	\$9,473.55	\$5,420.80	\$4,052.75	74.76 %
▼ 45000 Donor-restricted fu...				
45900 H. E. Reed Fund int...	14,400.00	-	14,400.00	-
Total for 45000 Donor-res...	\$14,400.00	-	\$14,400.00	-
46100 Unrestr Fund Invest. (te...	1,008.46	3,493.94	-2,485.48	-71.14 %
46300 Temp. Restr Fund Inv. (t...	1,792.81	887.23	905.58	102.07 %
41500 Subscription Sales (thr...	-	2,090.08	-2,090.08	-100.0 %
> 44000 Board-designated ...	-	\$3,871.04	-\$3,871.04	-100.0 %
Total for Income	\$38,512.42	\$48,939.86	-\$10,427.44	-21.31 %
▼ Cost of Goods Sold				
> 50000 Cost of Goods Sold	\$631.80	\$11,732.55	-\$11,100.75	-94.61 %
Inventory Shrinkage	53.23	-	53.23	-
Total for Cost of Goods Sold	\$685.03	\$11,732.55	-\$11,047.52	-94.16 %
Gross Profit	\$37,827.39	\$37,207.31	\$620.08	1.67 %
> Expenses	\$38,846.24	\$36,658.22	\$2,188.02	5.97 %
Net Operating Income	-\$1,018.85	\$549.09	-\$1,567.94	-285.55 %
> Other Income	\$15,532.80	\$11,757.85	\$3,774.95	32.11 %
> Other Expenses	-	-\$4,256.95	\$4,256.95	100.0 %
Net Other Income	\$15,532.80	\$16,014.80	-\$482.00	-3.01 %
Net Income	\$14,513.95	\$16,563.89	-\$2,049.94	-12.38 %

🔑 **Pliaj ŝlosilaj punktoj por komparo:**
Kongresaj enspezoj de ELNA en 2024 alvenis en majo, ĉar ni rekte organizis la eventon. Por 2025, la kongreso okazas en Kanado kaj la teamo de KEA administras la enspezojn. Ĝis nun ni komprenas, ke ili ŝajne preterpasos la buĝeton.

Membrekotizoj de ELNA ne kutime akumuligas por ĉiuj membroj ĝis la jarfino, do en ĉi tiu enspezzinio ni atendas tempan ŝanĝon.

Vendoj ("Catalog Sales"), ĉefa linio por la librobutiko, estas klare pli alta ol en 2024. Ni estas entuziasmaj pri la nova librobutiko kaj aktive esploras

novajn varojn (libroj kaj aliaj produktoj, kiel ĉemizoj, glumarkoj ktp.).

Reed Trust-linio reprezentas monon, kiu pasis tra ELNA al ESF por NASK. En ĉi tiu raporto ĝi ĉefe kompensas la supran tempan misŝovon rilate al Kongresaj enspezoj. Ĉi tio malaperos en la dua duono de la jaro, kiam ni ricevos nian parton de DLK-enspezo kaj aliajn eventojn, kiel UBFF-donacoj.

Kion ni konstruis kaj riparis:

Profesiigo de financoj:

- Dungita profesia kontisto
- Kompleta migrado al QuickBooks Online (QBO)
- Purigado de pli ol jardeko da financaj dosieroj por precizaj 990-raportoj

Starigo de fincasistemo:

- Precizaj kaj facile alireblaj kontlibroj en QBO
- Uzo de AI-funkcioj en QBO por datumkomparo kaj konsiloj
- Kvankam ni konsideris pli malmultekostan QBO-planon por ŝpari plurajn centojn da dolaroj jare, teknikaj limigoj de la vendisto malebligis tion; ni konservis la nunan planon por stabileco

Strukturo de fondusoj:

- Disigo de limigitaj kaj nelimititaj investoj por preciza spurado de elspezoj
- Simpligo de la klasstrukturaro al kvar ĉefaj kategorioj: Edukado/Ĝenerala, Edukado/Stipendioj, Reklamado/Ĝenerala, kaj Reklamado/Eldonado
- Efektivigo de 10 % eltirado-planon por 2025 por respondeca subteno de

programoj kaj samtempa kreskigo per donackampanjoj kaj subvencipetoj

Politikaj kaj regadaj plibonigoj:

Enkonduko de raportpraktikoj kongruaj kun GAAP - Komenco de harmonigo de la kontplano kun nova buĝeta kadro - Aprobado de kvar ŝlosilaj politikoj kaj tri aldonaĵoj al nia financ-administrado politiko

Librobutiko:

Vendoj: 2 460 \$ vs. 2 250 \$ (2024) → 109 % de 2024 ĝis fino de majo

Kosto de Varoj Venditaj (KDVV):

685 \$ vs. 8 247 \$ → 8 % de la pasinta jaro

Vendplano 2025: 5 800 \$ (sen sendokostoj) – iom sub la plano, sed DLK-vendoj kaj novaj varoj en la butiko espereble kreskigos vendoaktivecojn

KDVV-plano: 6 675 \$ → 40 % pli alta marĝeno ol en majo

Ĉi tiuj ciferoj montras fortan komunuman engaĝiĝon kaj efikan administradon.

Financaj defioj laŭvoje:

Sistemaj eraroj: duplikataj kontoj, malĝustaj saldoj (ekz. – 98 000 \$), misa klasifiko de fondusoj

Datumaj breĉoj: necesis purigi PayPal-, UEA- kaj nedepozititajn fondusojn

Raportaj prokrastoj: pro la malregulaĵoj dum pluraj monatoj ne eblis liveri fidajn raportojn
Sed danke al persista laboro, ni eliris el tiuj defioj pli fortaj kaj travideblaj.

Kio sekvas?

- Lanĉo de formalaj strategioj pri donackampanjoj kaj subvencipetoj por malpliigi dependecon de fondusoj
- Daŭra kunlaboro kun ESF kaj UEA
- Esploro de ebleco transdoni parton de investoj al aktiva administrado kun Morgan Stanley por plibonigi rentojn
- Esploro de partnereco-opcioj kun LaBazar.com kaj Redbubble.com por krei kaj vendi varojn kun Esperanto- kaj Esperanto-USA-emblemoj

Dankon pro via subteno! Ĉi tiu jaro estis plenplena de transformo – nenio el tio eblis sen via subteno. Kun pli bonaj iloj, klaraj datumoj kaj komuna engaĝiĝo al travidebleco, Esperanto-USA nun estas finance pli forta kaj misie fokusita. Ni antaŭĝojas kunlabori por brila kaj daŭrigebla estonteco.



Angulo de la Kasisto estas afiŝoj de Mateo BROOKS dediĉita al antaŭenigo de financa travidebleco kaj edukado. Mateo ofte publikigas ĝisdatigojn — en Esperanto kaj en la angla — por klarigi kiel kontribuoj de membroj subtenas la mision de Esperanto en Usono, elstari financajn raportojn, kaj oferti konsilojn pri subvenciaj ŝancoj.

Legu ĝin en nia retejo!



Raporto de la Sekretario

Charlotte "Ĉaro" BURTON

Saluton geamikoj! Kia agadplena jaro! Dum la pasinta jaro, la estraro kaj Esperanto-USA mem fariĝis pli kaj pli profesia afero. Jaro post jaro, ĉiu estraro penas lasi la organizaĵon en pli bona stato ol tiel, kiel ni trovis ĝin. Same kiel antaŭaj estraroj laboris forte por malpliigi la elspezojn de la organizaĵo kaj pliigi la donacojn, ktp, la nuna estraro laboris forte dum la jaro. Jen kelkaj aferoj, kiujn ni sukcesis fari dum tiu tempo:

- Ni aŭskultis la voĉon de membroj pri la retbutiko kaj tute renovigis ĝin. Pli bela, pli uzebla, kaj akiras pli da varoj por ĝi.
- Ni kreis formalajn politikojn por certigi, ke niaj membroj restos sekuraj en ĉiuj spacoj, kiujn Esperanto-USA regas.
- Ni laboras pli profesie por plibonigi nian financon (vidu la raportojn de la kasisto).
- Ni interagis pli kun la internacia Esperanto komunumo, ekzemple per sugestoj ŝanĝojn al UEA, por pli bone reprezenti Esperantistojn en Usono.
- Ni kreis kaj aktivigis komitaton, la Ekzekutiva Komitato, kiu enhavas la Ĝenerala Direktoro kaj la oficistoj de la estraro. Tiu komitato laboras dum multaj horoj ĉiusemajne kaj kunsidas

kun diversaj profesiuloj por pliefikigi la organizaĵon.

- Ni laboras dum nekalkuleblaj horoj por krei novan membroliston, pli bonan kaj uzeblan.

Dum ĉiom da tiaj laboroj, mi, kiel sekretario:

- Skribas, redaktas, kaj organizas protokolojn de ĉiuj formalaj estrarkunsidoj, kaj disdonas tiujn protokolojn al la estraro.
- Kreas resumojn de la oficialaj decidoj de la estraro, kiujn mi sendas al la redaktistoj de la bulteno, por eldonado al la tuta membraro. Per tiuj ĉi kaj la protokoloj (en la retejo), vi, la membroj, povas scii ĉion, kion la estraro faras por vi kaj por la organizaĵo.
- Resumas la diskutadon kaj agojn de la ekzekutiva komitato, al la aliaj estraranoj.

Dum miaj jaroj kiel estrarano, kaj nun kiel sekretario, mi vidas, ke jaro post jaro, la estraro kaj Esperanto-USA mem fariĝas pli kaj pli aktiva kaj profesia. Dum tiom da agado kaj ŝanĝo, la defio kaj ĉeftasko de la sekretario estas, ke mi devas partopreni same multe kiel ĉiu alia oficisto kaj estrarano, sed samtempe, mi devas konstante registri la agadon kaj diskutojn, kaj

raporti al la estraro kaj la membraro,
ĉar vi ĉiuj rajtas scii tion, kion ni faras
por vi.

Se vi havas sugestojn pri kiel la
estraro povus pli efike komuniki kun la
membroj, aŭ se vi volus helpi pri la
komunikado de la organizaĵo, bonvolu
skribi al mi, ĉe
sekretario@esperanto-usa.org, kaj ni
diskutu pli rekte.





Raporto de la Membreca Komitato

Peggy DOLTER

En la membreca komitato estas Elle BECK, Gerry BOUDREAUX, Peggy DOLTER (komitatestro), Chuck MAYS, Murray MERNER, kaj Fred MEYER. Ĉe niaj ĉiumonataj kunvenoj ni ĝojas foje vidi Amanda SCHMIDT, Brandon SOWERS, kaj Quintyn BOBB. Jen resumo de niaj agadoj ekde post la kongreso en 2024.

Reaniĝoj: En novembro kaj decembro, komitatanoj persone kontaktis membrojn kiuj, je tiu tempo, ankoraŭ ne reaniĝis, per retmesaĝoj kaj telefonvokoj. Ni celis certigi ke ĉiuj konsciu ke la jarkotizo en novembro/decembro ankoraŭ estis je la malnova nivelo. Oni informis nin ke je la 1a de januaro 2025, E-USA havis proksimume 10% pli da membroj ol je la 1a de januaro 2024.

Membrolisto: Ni diskutis membrolistojn, kaj presitajn kaj elektronikajn. Elektronika estas preferinda ĉar oni povas ĝisdatigi siajn datumojn facile. Ni esploris unu softvaron, de CTRN, sed eksciis ke la estraro preferus softvaron pli ampleksan kiu povas servi la organizon diversmaniere. (Ili fine elektis softvaron kiu nomiĝas Springly, kaj baldaŭ membroj povos ekuzi ĝin, espereble dum la jarkongreso.)

Celoj: Ni legis kaj donis sugestojn pri la verkitaj celoj kaj politikoj de nia komitato.

Demandaro: Kaj la ĉefkomitatano kaj la vicprezidanto de E-USA kreis malnetojn de demandaro por membroj. La komitato foje legis ilin kaj donis valorajn sugestojn. La fina versio estos parto de Springly; membroj povos plenumi ĝin post ensaluti al siaj membraj kontoj tie.

Regionoj: En nia komitato estas uloj kiuj aparte interesiĝas pri regionaj retoj kaj lokaj kluboj. Fred Meyer jam dum kelkaj jaroj organizis la regionajn helpantojn. Nia vicprezidanto, Quintyn BOBB, kunlaboras kun Chuck MAYS pri revigligo de tiu sistemo, komence kun esploro pri kio efikus en la nuntempa realeco.

Dumvivaj Membroj: Kun la Centra Oficejo, dum la printempo ni komencis kontakti Dumvivajn Membrojn kies adresojn la organizo iam "perdis" pro transloĝiĝoj aŭ plurjaraj nekomunikoj. Kelkaj Dumvivaj Membroj "malaperis" (kvankam neniu el ili nomiĝis Gerda) antaŭ eĉ jardekoj. Niaj komitatanoj klopodis trovi ilin per diversaj rimedoj

kaj eĉ ankoraŭ klopodas. Oni vidu la liston je la sesa paĝo de la *Usona Esperantisto*, numero 2025:2!

Oftaj Demandoj: Je nia kunveno en junio ni konsentis legi kaj doni sugestojn pri la "oftaj demandoj" kiuj videblas en la retejo de E-USA.

Afiŝoj: Ni ŝatus ke kongresanoj vidu mallongajn resumojn pri la diversaj komitatoj en E-USA. Tiujn resumojn ni esperas meti en, aŭ apud, la libroservo. La celo estas inviti kongresanojn partopreni pli vigle en E-USA.

Dankon pro via interesiĝo!





Raporto pri la Speciala Interesa Grupo (SIG) pri Amatora Radio

Chuck MAYS

Priskribo de la SIG:

Parto de tiuj, kiuj parolas Esperanton, ankaŭ ekinteresas pri amatora radio. Ĉi tiu intereso verŝajne devenas de iuj interkovroj. Kaj Esperanto kaj amatora radio estas internaciaj. (Radio-ondoj ne haltas ĉe landlimoj.)

Celoj de la SIG:

- Tiu, kiu ekinteresiĝas pri amatora radio, devas havi permesilon, kaj ricevi helpon de mentoro, povas esti tre helpa. Do, la SIG subtenas tiujn, kiuj estas novaj al amatora radio, per konsiloj pri ekipaĵo, komunikada protokolo, ktp.
- Kelkaj radioamatoroj trovas sian vojon al Esperanto per sia radia ŝatokupo. La SIG trovas manierojn konatigi Esperanton en la amatora radia komunumo kaj provizi helpon en lernado de Esperanto kaj kiel implikiĝi.

Agadoj de la SIG en 2024/2025.

- Post la nacia kongreso en Los-Anĝeleso en 2024, la grupo vizitis la ŝipon Queen Mary kaj specife vizitis la radio-ĉambron de la ŝipo. La grupo funkciigis la ŝipan radion kaj kontaktis kelkajn aliajn radiostaciojn.
- Dum la tuta jaro, la SIG gvidis semajnan konversacian grupon en

Esperanto sur platformo nomata Echolink. Oni devas havi radio-amatoran permesilon por uzi ĉi tiun platformon. Partoprenantoj el Eŭropo, Japanio, Sud-Ameriko kaj Nordameriko aliĝis al la grupo regule.

- La SIG havis informbudon ĉe la ĉiujara amatora radia kunveno en Raleigh, Norda Karolino. Vidu la bildon. Multaj homoj, kiuj neniam aŭdis pri Esperanto, vizitis la budon, kaj kelkaj esperanto-parolantoj surpriziĝis per vizito.
- Du SIG-membroj aĉetis radio-ekipaĵon, kiu kapablas komuniki tutmonde. Unu membro de la SIG studis kaj ricevis la necesan permesilon por uzi la altfrekvencan spektron, kio ebligas komuniki tutmonde.

Planita por 2025/2026

- Krei prezentaĵon, kiun radioamatoroj povas uzi ĉe sia loka klubo kiel enkondukon al Esperanto.
- Daŭrigi la semajnan esperantlingvan grupon por radioamatoroj.
- Denove havi informbudon dum la amatorradia kunveno en Raleigh.





Spertoj kiel estrarano de Esperanto-USA

Ruth "Margo" KEVESS-COHEN

Mia spertoj dum mia trijara mandato en la estraro de Esperanto-USA estis tre variaj kaj interesaj. En la unua jaro mi fokusiĝis pri lernado de la strukturo kaj funkciado de la organizaĵo, kaj klopodis decidi, kiel mi povus plej efike kontribui al ĝia sukceso. Dum la dua kaj tria jaroj mi koncentriĝis pri specifaj projektoj, kiujn mi taksis plej valoraj por la sukceso de la organizaĵo kaj de la Esperanto-movado en Usono ĝenerale.

Estis por mi granda privilegio kunlabori kun skipo de tre talentaj kaj diligentaj esperantistoj, kiuj plene dediĉas sin ĉiutage al Esperanto kaj al la misio kaj celoj de Esperanto-USA. Ilia entuziasmo instigis min plenumi miajn celojn kaj igis mian laboron en la estraro interesa kaj plaĉa.

Mia ĉefa kampo en la estraro dum la pasintaj tri jaroj estis Edukado. Tiucele mi laboris kun estraranoj kaj aliaj membroj de la Esperanta komunumo en Usono kaj eksterlande pri pluraj edukaj projektoj, inkluzive de:

1. serio de mallongaj filmoj pri la gramatiko de Esperanto por anglalingvanoj [ligita poste]
2. aplikaĵo bazita sur la kurso ĉe Lernu.net sed kreita sendepende de la Lernu-organizaĵo [ligita poste]

3. mallonga artikolo pri gramatika temo por ĉiu numero de Usona Esperantisto, bazita sur edukaj klarigoj verkitaj de la sperta Esperanto-instruisto Lee Miller en la Facebook-grupo "Esperanto Learners";
4. informoj por niaj membroj pri internaciaj Esperanto-kursoj, precipe tiuj de la Londona Esperanto-Klubo; kaj
5. financado de provekzamenoj prepare al la KER-ekzamenoj, kun presado kaj sendado de diplomoj por usonaj kandidatoj.

Alia kampo, pri kiu mi fokusiĝis dum mia deĵoro en la estraro, estis la financoj de E-USA, inkluzive de investoj kaj fondusoj. Mia laboro temis pri esplorado kaj raportado al la estraro pri la fontoj de niaj financoj, inkluzive de donacoj kaj heredaĵoj. Kiam ni ricevis donace grandan sumon post la forpaso de iama membro de Esperanto-USA, Robert Swenson, mi kontaktis kaj intervjuis lian filinon kaj verkis artikolon pri li por nia bulteno. Mi ankaŭ partoprenis kunsidojn pri nia financaj organizado kaj planado.

Jen miaj konsilo por estontaj estraranoj: ĉeestu ĉiujn kunvenojn, estu aktiva en nia Slack-kanalo, kie okazas tiom da grava komunikado, kaj serĉu

manierojn kontribui al la laboro de la estraro. Vi estas bonŝancaj kunlabori kun admirinda grupo da homoj, kiuj plene dediĉas sin al gvidado de la Esperanto-movado en Usono tre efike kaj respondece. Ankaŭ vi kapablas ludi gravan rolon en la usona Esperanto-movado kiel membro de la estraro de Esperanto-USA.



Ligilo al aplikaĵo por lerni la gramatikon de Esperanto:




<https://link.edapp.com/VCRevR4F0Bb>

Ligilo al mallongaj filmoj pri la gramatiko de Esperanto:



<https://www.youtube.com/@gramatikaj.filmetoj>





Pensoj pri la PER en 2025

Bill MAXEY

La Printempa

Esperanto-Renkontiĝo (PER), la ĉiujara mez-atlantika regiona aranĝo, okazis la 14an ĝis la 16a de marto en sia kutima montara ejo en okcidenta Norda Karolino. Post kelkajara evoluado, la PER-strukturo nun estas ŝablona, ĉar pruvite sukcesa: varma interpersona etoso en bela loko, kun kulture riĉa programo kaj distraj eroj. Kredeble ĝi povos roli kiel modelo por aliaj samcelaj renkontiĝoj.

Gravan rolon ĉiam havas la parola lingvo, aparte notinde en la intence dialoga interkona vespero kaj la laŭvolaj prelegetoj de la partoprenantoj. Nun kernaj partoj de la tagordo, ambaŭ disponigas al la grupanoj tempon kaj okazon konigi siajn interesojn kaj kapablojn al la aliaj, kaj do servas por plifortigi la interpersonajn ligojn.

La programon konsistigas apartaj eroj pri la lingvo, kulturaj temoj kaj literaturo, plus distra vespero, ekskurso kaj kunmanĝado. Prilingve ni ĉijare ekkonis bonalingvismon, novan etimologian retejon kaj detalojn pri prononcado, kaj diskutis mallonge pri novaj vortoj kaj la aktuala evoluado de Esperanto. Agnoskante la UK-on en Burno, la literatura fako metis en la fokuson ĉefe verkojn de ĉeĥaj aŭtoroj,

kun poemoj, kantoj kaj fragmentoj de noveloj kaj romanoj, de SCHULHOF ĝis URBANOVÁ kaj PIĈ.

La pli grava el la prikulturaj prezentaĵoj omaĝis al la ĵus forpasinta Renato CORSETTI. Aldone al biografiaĵoj ĝi inkludis resumon de prelego de Ahmad MAMDUHI pri "Renat(ism)o", t.e. manieroj agadi kongrue kun la bazaj principoj de tiu mirinda homo. Skizaj historioj pri Esperanto en Kanado kaj Usono preludis la somerajn aranĝojn en Toronto. (Tute hazarde, tiuj PER-sesioj koincidis kun la 120a datreveno de la fondo de la Amerika Esperanto-Asocio, la unua en Usono, la 16an de marto de 1905.)

Pluvema vetero malebligis la kutiman ekskurson ĝis proksima arbara akvofalo. La elturniĝemaj PER-anoj tamen trovis kreivajn paroligajn ludojn por pasigi la ripozotempon. La distra vespero elmontris tre diversajn talentojn, per pian- kaj gitar-ludado, ritma orkestro, "hamboning", skeĉo (de Stefan MCGILL) kaj kunkantado de *La lasta kanto* (de Kajto). Videoj de John WELLS akordione ludanta skotajn folkmelodiojn gajigis la etoson eĉ pli.

Kiel kutime, dum la fina sesio la grupo pridiskutis siajn spertojn dum la semajnfino, kun komentoj kaj ideoj pri

konsiderindaj ŝanĝoj. La ĝeneral takso montriĝis tute pozitiva. Ĉiuj konsentis pri estonta limigo de aliĝintoj al 20, por konservi la aparte plaĉan intiman etoson. Eventuala aldono de unu plia tago al la aranĝo, kredeble kiel laŭvola elekto, meritas plian pripensadon. Venontjare, ni antaŭvidas pli da kunlaborado rilate la programon, cele al laŭgrada kapablo de novaj gvidantoj. Pluraj homoj do preparos la materialojn kaj estros la sesiojn. Certe la prelegetoj denove havos sian gravan lokon, ĉar ili pretigas homojn prezenti antaŭ pli grandaj grupoj. Bonŝance la jaro 2026 kunportos plurajn datrevenojn kiuj inspiras ideojn por ellaborado de suka programo.

Jaron post jaro la nombro de aliĝantoj kreskas, kaj pli ol 60 elcento de la ĉijaraj PER-anoj jam partoprenis en antaŭaj jaroj. Tiuj faktoj atestas ke nia kombino de diversspecaj prezentaĵoj kaj distraj aferoj rezultigas tre kontentigan sperton. Serioza kultura komponento aparte gravas ĉar nuntempe mankas oportunaj manieroj lerni pri tiaj aferoj. Kelktaga renkontiĝo de esperantistoj prezentas perfektan—kaj maloftan—okazon starigi mini-NASK-on. Ni ne maltrafu ĝin!

Multan dankon al E-USA pro la subvencio de la renkontiĝo kaj meritajn laŭdojn al Chuck MAYS pro lia ĉiam lerta organizado de la aranĝo.





Pensoj pri la 6a Usona Bona Film-Festivalo

Catherine "Kejti" NEILSON

La 6-a Usona Bona Film-Festivalo ekis jela 26-a de aŭgusto kaj finiĝis je la 22-a de oktobro, 2024. La Usona Bona Film-Festivalo kreiĝis kun la celo stimuli esperantan filmokreadon, kaj denove en la 6-a festivalo, ni sukcesis pri ĉi tiu celo. Ni ricevis 26 filmojn ĉi-jare, kiu kreskis la tutan kvanton al 179 filmoj kiuj estis kreitaj pro la Film-Festivalo. Ĉi-foje estis la unua en kiu mi, Kejti NEILSON, estris la festivalon, post la deĵoro de Alekso MILLER dum la antaŭaj. El ĉi tiu festivalo, 8 filmoj akiris pli ol mil spektantojn en Jutubo kaj unu el tiuj akiris 60,000 spektantojn. Ĉi tio estis miriga kvanto de atento al Esperanto-USA kaj Esperanto mem, pri kiu la teamo kiu muntis la festivalon ege feliĉiĝis.

Mi estis la estro de la festivalo ĉi-jare. Mi ĉefe faris tri aferojn: mi dum la konkurso respondadis al retroŝtoĵoj de partoprenantoj, mi kreis videojn por diskonigi helpajn informojn, kaj post kiam la konkurso finiĝis por ĉiuj la aliaj partoprenantoj, mi organizis la filmojn por publika afiŝiĝo kaj konserviĝo. Dum la konkurso, mi multe komunikis kun la teamo de Esperanto USA, inkluzive de Brandon SOWERS, Amanda SCHMIDT, kaj Quintyn BOBB, aldone al multe da helpo kaj konsilo de Alex MILLER. La

uzo de la Esperanto USA Slack kanaloj multe helpis lokigi ĉiujn en la sama retloko por ke ni povus interkomuniki plej glate.

La ĉefaj malfacilaĵoj venas post la finiĝo de la konkurso mem. Ni devas afiŝi ĉiujn videojn, certigi ke ni havas la ĝustan version de ĉiu filmo, konservi ĉiujn dosierojn, afiŝi ilin en YouTube, kaj certigi ke ĉiuj estas konservata en dua sekura loko (komputile) kaze ke io okazus al la YouTube kanalo, aldone al kelkaj aliaj rilataj taskoj. Ĉi tiu procedo estas la plej malfacila parto de la festivalo por la estro. Ĉi-jare mi bonŝance havis helpon de Alex MILLER por instrui min kiel plej bone fari ĉi tiun taskaron, kaj mi esperas ke estos pli glate estonece. La estrado de la Usona Bona Film-Festivalo prenas multe da tempo kaj kunfarado. Por mi kiel la estro, la subteno kaj komunikemeco de la E-USA-uloj estis gravega por ebligi ĉi tiun festivalon. La festivalo jam kreis tiom da bonkvalitan filman arton en Esperanto, kaj povus daŭre stimuli tian kreadon se la festivalo povos daŭriĝi. Mi esperas ke la festivalo povos daŭriĝi estontece kun alia estro kaj subtenema teamo post la 7-a Usona Bona Film-Festivalo.





Pensoj de Aktiva Membro de Nia Komunumo

Vince “Vinĉjo” ALLISON

Dum la pasinta jaro, mia engaĝiĝo kun la Esperanto-komunumo estis aparte riĉa kaj kontentiga, precipe en mia rolo kiel instruisto kaj per mia partopreno en eventoj kiel PER kaj Paralela Universo.

Instruante Esperanton

Estis granda plezuro denove instrui Esperanton al komencantoj kadre de la [Londona Esperanto-Klubo](#). Mi gvidis du virtualajn kursojn, kiuj daŭris po 11 semajnojn. Unu okazis aŭtune kaj la sekvan vintre, kun ĉirkaŭ ok studentoj en ĉiu klaso. Mi konsideris paŭzon dum la vintro (kaj alia instruisto gvidus la sekvan kurson), sed la studentoj forte deziris min por la sekvan kurson, do mi akceptis.

Dum mia instruado, unu defio evidentiĝis: homoj lernas laŭ malsama rapideco. Estas malfacile trovi ritmon, kiu certigas, ke neniuj studentoj estas forlasita, sed ankaŭ, ke la kurso restas engaĝiga kaj valora al la rapidaj lernantoj / pli spertaj studentoj. Mi kutime superas tion taksante, kie ni bezonas malrapidiĝi kaj kie ni povas akceli por kompensi tempon. Kelkfoje la leciono daŭras iomete pli longe, kaj tio estas en ordo. Se iu ajn havas problemojn, mi ĉiam proponas

individuan helpon per retroŝto por respondi demandojn.

Mi aparte ŝatis vidi laaktivan lernadon; plurfoje studentoj demandis pri aferoj, kiujn ni estis kovrontaj nur kelkajn lumbildojn poste, kio klare montris ilian atenton kaj antaŭvidon. Estis mirinde atesti la progreson de komencantoj, kiuj unue ne povis kunigi frazon, sed nur post iom da tempo povis kapable konversacii. Kelkaj studentoj eĉ daŭrigis kun semajnaj legado-praktikoj post la fino de la kursoj. Du el ili planas ĉeesti Esperanto-eventojn en Toronto ĉi-jare, kio estas vere elstara signo de ilia kreskanta engaĝiĝo.

Paralela Universo

Mi ankaŭ kontribuis al la [Paralela Universo \(PU\)](#) evento ĉi-jare. PU estas tutmonda evento, kiu okazas en diversaj lokoj samtempe. La celo de PU estas instigi Esperantistojn fari ion, kio sentigas ilin parton de pli granda, tutmonda movado. Mi helpis organizi nian lokan eventon en Okcidenta Virginio. Nia grupo kunvenis en Huntingtano por tagmanĝi, ni vizitis lokajn eventojn en la urbo kiel la lokan Italian Festivalon, kaj esploris la urbon. Ni estis malgranda grupo, sed laevento

estis sukceso. Ni eĉ havis la oportunon disvastigi Esperanton al kelkaj homoj.



Printempa Esperanta Renkontiĝo (PER) 2025

Mia unue partoprenis en [la Printempa Esperanta Renkontiĝo](#) en 2024, kaj mi tiel ŝatis la sperton ke mi denove partoprenis en 2025. Mi ofte priskribas PER kiel la inverson de Universala Kongreso — ne bone aŭ malbone, sed pro sia etoso. Anstataŭ granda urbo, ni kunvenas en la montaro; anstataŭ centoj da homoj, ni ĝuas intiman etoson kun malpli ol 20 partoprenantoj. Dum la tuta semajnfino, ni ĉiuj kune partoprenis en diversaj agadoj kaj manĝis kune. Tiel ni vere ekkonas unu la alian. Tio kreas vere proksiman kaj memorindan sperton.



Celoj por PER 2026

Oni petis min esti la gvidanto por PER 2026, kaj mi feliĉe akceptis. Miaj ĉefaj celoj estas krei same agrablan kaj intiman eventon. Mi volas certigi, ke ĉiuj partoprenantoj havu la eblecon fari mallongan prezenton aŭ prelegon, kiel ni faris en la pasinteco. Aldone, mi intencas enkonduki kelkajn pliajn ludojn, kiuj amuze kuraĝigos paroladon, plifortigante la konversaciajn kapablojn de la partoprenantoj en malstreĉa maniero. Mi vidos vin tie en 2026!

Bluesky

Krome, mi ankaŭ komencis aŭdi en Bluesky, nova socia retpaĝo, esplorante novan platformon por konektiĝi kun samideanoj kaj dividi spertojn en Esperanto. Sekvu min - [@vince.wvesperanto.org](#)



Londra Esperanto-Klubo



Paralela Universo



Retejo de PER

Ni rememoras la kontribuon de la jenaj membroj, kiuj aŭ forpasis ĉi-jare aŭ kies forpason ni eksciis en 2025. Ilia sindediĉo al Esperanto-USA restos en niaj koroj.

Ĉi-jaraj forpasintoj

Sergio Bojko — 2a de majo, 2025
Charles Powers — 2a de aprilo, 2025
Teuntje E. Goldman — antaŭ 26a de aprilo, 2025
Mary Beth Perreault — 6a de aprilo, 2025
Jim Henry — 25a de majo, 2025
Arlyn Kerr — 27a de junio, 2025

Antaŭaj jaroj (eksciigis en 2025)

Donald W. Bushaw — 15a de januaro, 2012
Joseph Gamble — 29a de decembro, 2017
Raymond Longley — 25a de novembro, 2001
Calla Allen — 12a de majo, 1999
Robert A. Burgess — 21a de januaro, 2017
Michael R. Lewis — 26a de julio, 2021
Dr. Francisco E. Ballard — nekonata dato de forpaso

